

AVENO 37 - AVE kaj la Verdaj Partioj & Esperanto
aktuale 2011-06-01 ĝis 2011-12-31

jen: aktuale, Verdaj (kaj aliaj) Partioj kaj Esperanto, gravaj dokumentoj, pri verdaj rezultoj, arkivo da okazajhoj

2012-03, Dakaro (Senegalio), Tutmonda Verda Kongreso. www.globalgreens.org/senegal2012
AVE intencas prezenti la temon lingva justeco pere de Esperanto. Espereble ni trovos AVE-anojn - au lokajn samideanojn - kiuj povos partopreni. AVE kutime partoprenis la Tutmondajn Kongresojn de la Verdaj Partioj (en Canberra 2001 kaj Sao Paulo 2008)

Esperanto en la programo de la franca verda partio "Europe-Ecologie" - okaze de la asembleo en Akvitanio:
"La kultura politiko de Europa Unio devas plirichighi je chiuj kontribuajhoj de la europa diverseco, precipe per favoro al la movigho de artistoj, subteno al kreado kaj al nuntempa arto, disvolvado de la interghanghoj, protektado de la komuna europa heredajho, kuraghigo al multlingveco kaj Esperanto, protektado de la regionaj lingvoj. La kultura diverseco estas shirmenda richajho de la homaro." (2011-02)
<http://aquitaine.regions-europe-ecologie.fr/signez-l-appel/2066-ekologio-konkeru-akvitanion/>

Junaj Verduloj en Europo: jen ilia sinprezento - ankaŭ en **Esperanto**:
<http://www.fyeg.org/main/index.php/about-fyeg>
Tie vi ankaŭ trovos la adresojn de la landaj organizoj de Junaj Verduloj en tuta Europo.

2011-07-12, Bruselo, **Jong Groen!** (la junaj verduloj en flandra Belgio) **postulis daurigi la plej lastan trajnon** dumnokte por reveturi je la semajnfino de la chefurbo al la mar-borda regiono. 60 el ili uzis tian noktan trajnon je entrajna manifestacio, protestante kontraŭ ties abolicio flanke de NMBS. (Iau www.fyeg.org)
Komento (AVE/mw): certe luksa postulo se oni komparas kun malbonaj vetureblecoj en aliaj partoj de la mondo; sed aliflanke en tia socio gravas ankaŭ por homoj de la marghenaj regionoj aparteni al la kulturo de la chefurbo. Sed ja okazas pli da trafik-akcidentoj au perfortoj kiam necesas meznokte reveturi individue post festo, kinejo au koncerto. Do, bonan sukceson!

Kaj jen la retejo por la **Globalaj Junaj Verduloj** - vi povas elekt vian kontinenton, kaj krome oni vidos la alighitajn membro-organziojn: http://www.globalyounggreens.org/wordpress/?page_id=498

EEU Europa Esperanto-Unio (EEU), Avenue Louise 405, bte 9, BE-1050 Bruselo
eeu@europa.eu, <http://www.europa.eu/en/chefpagho>

Pirato-Partio: Ene de la nova Piratopartio <http://www.piratopartio.org> komencighis Esperanto-grupo.
Char Piratoj el Svedio estas kun 2 parlamentanoj en la komuna frakcio Verduloj & Regionalistoj & Piratoj (Greens /EFA) de la Europa Parlamento, AVE proponis kunlaboron por alparoli ankaŭ ilin en tiu frakcio.
<http://wiki.piratenpartei.de/BE:Wahlprogramm/Kurzform/Esperanto>

2011-11 **Esperanto en la naciaj parlamentoj:**
Interesa fakto pri slovenaj balotoj. La parlamenton reeniris post trijara paŭzo malgranda partio Nova Slovenio, kiun gvidas (prezidas) Ljudmila Novak, esperantistino kaj antaŭa membro de Europa PARlamento. Shi ighis slovena parlamentanino kiel unu el 4 membroj de shia partio. ljudmila.novak@gmail.com (Iau Zlatko)

2011-11-13 **Eŭropa Verda Partio okaze de sia kongreso deklaris en Parizo:**
Reprezentantoj de la Eŭropaj Verdaj Partioj adoptis hodiaŭ en Parizo politikan proponon de 12 punktoj elpaŝi de la aktuala financa, sociala kaj ekonomia krizo trafante Eŭropon, kaj montris vojmapon por nova bazigo de la Eŭropa projekto:
"Ĉi tiuj krizoj erozias la socian koherecon kaj estigas politikan diseriĝon de la kontinento, puŝante nin al negraveco en la 21a jarcento. Iu ajn scenaro kiu estigas la disrompon de la Eŭrozono, kiu estus la unua paŝo al politika diseriĝo de Eŭropo, estas neakceptebla por ni. Aliflanke, ajna plibonigita politika integriĝo de la Eŭrozono ne rajtas estigi la kristaliĝon de du-rapideca Eŭropo", diris Philippe Lamberts, MEP (Membro de la Eŭropa Parlamento) kaj kunprezidanto de la Eŭropa Verda Partio.

"La batalo por Eŭropa demokratio ne finis. La malsimpatiiĝo de la publika opinio rilate al la EU kreskadas pro la malkapablo de la 27 membro-ŝtatoj produkti daŭrigeblajn kaj progresemajn komunajn solvojn rilate la multflankajn krizojn kiuj trafadas la civitanojn", diris Monica Frassoni [monika], kunprezidantino de la Eŭropa Verda Partio. "La nuna direktado-mekanismo estas tute neadekvata. Sed la kreskiganta malfortigo de la komunaj institucioj favorante malmodernan regadon gvidata de 'Merkozy' (Merkel & Sarkozy) faros nenion por plibonigi la situacion".

La Verda propono inkluzivas:
Fari la ŝuldoŝarĝon de Grekio eltenebla;

Fari la Eŭropan Financan Stabileco-Fonduson (EFSF) (kaj estontan stabileco-mekanismon (ESM)) efika barilo;
Rekapitaligi la Eŭropajn bankojn; (fortigi la kapitalon de la bankoj)
Rebalanci la sintenon al nura ŝparemeco;
Forte rereguligi la financan industrion de Eŭropo;
Evoluigi ampleksan Eŭropan imposto-strategion, ekzemple aktive batali kontraŭ imposta fraŭdo, kaj malebligi impost-evitadon;
Establi Eŭropan Financan Fonduson (monetary fund, EMF);
Fari la makro-ekonomian observo-kadron funkciebla kaj pli ekvilibra;
Fari la EU-buĝeton instrumento de ekonomia politiko, kiu kreos fortan kaj validan Eŭropan Fiskon;

Lanĉi **Verdan Novan Konsenton por Eŭropo (Green New Deal)** kiu inkluzivas:

- Balanci la celojn de EU-2020 rilate stabilecon kaj kreskon, kaj financadon;
- Pli efikigi la prezon de CO2 pere de fortigita reduktado al 30% da forcej-gasaj emisioj (GHG) ĝis 2020;
- Altrudo de karbono-streĉtestoj al financaj institucioj, la enkonduko de klimato-risko kiel sistema (trapestranta ĉien) en la leĝ-donadon, la antaŭenigo de verdaj indicoj al kiuj indico-bazitaj fondusoj povas orientiĝi, la evoluado de verda bankado, kun imposto-rabatoj kiam konvenas;
- Permesante la Eŭropan Investo-Bankon (EIB) eldoni verdajn obligaciojn por subteni verdajn investojn;
- Postuli al publikaj kaj privataj pensio-fondusoj asignadi proporciojn de ilia portfolio al verdaj investoj kaj firmaoj.
- Efektivigi energio-transiron al renovigeblaj energioj, eliri el atoma kaj fosiliaj brulaĵoj.

Kune decidi fundamentajn ekonomiajn politikajn gvidliniojn;
Konvencio por nova Eŭropo.

La plena teksto de la Pariza Deklaro estos havebla ĉe www.europeangreens.eu/congress/.

Ankaŭ la Junaj Verduloj de tuta Eŭropo renkontiĝis en Parizo okaze de la Kongreso de la Eŭropa Verda Partio. Hodiaŭ, ili okazigis simblan spektaklon favore al alternativaj energioj kaj por eliri el la atomenergio en tuta Eŭropo. Ili miris kial kelkaj landoj, ekz-e Pollando, Litovio kaj Bulgario planas investi en atomenergiecon eĉ post la jardekoj-daŭrantaj katastrofoj de Ĉernobilo kaj Fukushima, kiuj ne estas barataj de naciaj limoj; kaj instigas Francion kaj aliajn landojn sekvi la ekzemplon de Germanio kaj Svisio kaj eliradi el la atomenergio. Same ili instigis batali kontraŭ la mitoj kaj la lobiado flanke de grandaj financaj interesoj, kiuj riĉiĝas el la uzado de atomenergio.

Sed necesas dume investi en la renovigeblajn energiojn el suno, vento, akvofortoj, geotermiko kaj bioenergio (ne preterlasante la naturprotektion). Kaj ili rememoris, ke al tiu ŝanĝo de energi-fontoj apartenas nepre la subtena politiko por pli efika kaj ŝparema uzado de la energioj.

FJEV: Federacio de la Junaj Eŭropaj Verduloj (FYEG): <http://www.fyeg.org>

2011-11-11/13, Eŭropa Kongreso de la Verduloj okazis en Parizo. **Raporto de AVE-anoj**

Plurlingva kvinopo da (Rugh)-Verduloj de AVE partoprenis por prezenti Esperanton, chiu bone kontribuis. Manfred rekte disdonis la novan verkon de MAS "Kien la Klimato - N-ro 2" al Rebecca Harms, ŝi estas kun-prezidantino de la Frakcio de Verduloj, Regionalistoj kaj Piratoj, kaj de ŝi kaj de la tuta frakcio estas artikolo pri la klimata krizo en tiu-chi tute aktuala kaj libro; kaj multaj estis surprizitaj vidi Le Monde Diplo - en Esperanto (dank al <http://www.mas-eo.org> - kaj Vilhelmo Lutermano, al kiu ni gratulas por ĵhus plenumita tri-kvarona jarcento). Dank al Isabelle kaj UFE ni havis bele grandan rubandon pri justa lingvopolitiko & Esperanto. Michael ligis Esperanton kun sia laboro por la "Individuaj Subtenantoj de la Eŭropa Verda Partio", kaj substrekis ke ankau homoj, kiuj ne estas membro de Verda Partio en sia lando, rajtas esti subtenantoj. Christopher kiel kunfondito de la Verda Partio en Irlando kaj ankau de AVE fortigis nin per argumentado en la angla lingvo kaj multaj kontaktoj. Kaj Georges ege bone klarigis la gramatikajn avantaĝojn de Esperanto. Bedaurinde al Dominique kaj Pierre lastmomente estis nebla veni.

Ni chiuj havis multajn bonajn interparolojn kaj pluraj iam lernetis Esperanton kaj ghojis retrovi ghin; kaj nia plurkapa cheesto jam estis valora de si mem.

Dimanche antaŭtagmeze ni havis bel-agrablan & informan kunvenon en la gastejo de Extérieur Quai, apud la orienta stacidomo, kion partoprenis Harald kaj André.

Pri la kongreso: http://europeangreens.eu/congress/?page_id=18

Miksitaĵ informoj el verdaj partioj

2011-12, Verduloj kontraŭas la planatan **ACTA**-traktaton de EU:

La registaroj de la EUaj landoj hodiaŭ decidis subskribi la ege kontraŭata ACTA-traktaton, pri kiu ekde 2008 estis sekrete traktata. La traktato pri la protektado de patentaj kaj aŭtoraj rajtoj estos subskribata de EU dum la kunveno de la Mondokomerca organizaĵo. Bart Staes (Verdula Eŭropa Parlamentano) koleras kontraŭ la estonta subskribo.

(Pli, en diversaj lingvoj) <http://www.greens-efa.eu/de/durchsetzung-von-marken-und-urheberrecht-5090.html>

- Dosiero de la Verdula Frakcio en la Eŭropa Parlamento pri ACTA
- Studo pri la efiko de ACTA sur la konstituciaj rajtoj, kaj sur sanigiloj.

2011-11-27 Gratulon al la Verduloj por ilia sukceseto en **Katalunio kaj Hispanio**:

Je la elektoj al la parlamento la katalonia ICV ricevis 3 seĝojn (antaue 1), kaj la hispana unuighita verdula partio EQUO, kiu estis fondita nur en somero, ricevis 300 000 (1,5%) da voĉoj, kaj dank al koalicio Compromis-EQUO ili ricevis 1 seĝon (por Valencia) en la nacia parlamento.

<http://www.equova.org/nuestras-ideas/>

Hungario: Ambau reprezentantoj de la verda partio parolis kaj deklaris sian malkontenton pri la naciisma politiko de la aktuala registaro.

2011-09-25 Francio, La Verda Partio, **Europe Ecologie Les Verts**, ricevis bonan subtenon de la voĉdonintoj por la senato. Nun estas 10 (+6) da homoj, ghendre bone miksitaj (5+5). Gratulon al ili.

2011-06 Finnlando, Por regi en Finnlando kunlaboras "Chiel-arka Koalicio", inkluzive de la Verduloj. La estro de la partio Ville Niinistö estos ministro por la natura medio, kaj Heidi Hautala lasos sian postenon en la EP por ighi ministrino por evoluo kaj shtataj entreprenoj.

Heidi Hautala delonge scias ke ni esperantistoj de AVE kunlaboras kun la Verduloj.

2011-06 Turkio, Yesiller (la Verda Partio) partoprenis la baloton ene de la bloko "Laboro, Libereco kaj Demokratio" kiu gajnis 6% (36 seĝoj); bedaurinde la verdpartia kandidato Sehbal (Mugla) ne sukcesis. Yesiller protestas kontraŭ la ne-demokrata elekto-legho, kio baras la veran reprezentadon.

2011-06 Francio: Antaubalalota kampanjo por la prezidenteco, 2012

http://eo.wikipedia.org/wiki/Francaj_ekologiistaj_anta%C5%ADbalotoj_de_2011

(tradukita de Fabien Tschudy)

2011-06-30/ 07-02, Bruselo, **"Seminario por la Europa Verda Aktivisto"**

Se vi loĝas en membro-shtato de la Europa Konsilio kaj volas lerni pli pri la EU-aktoroj, keil funkcias politiko en la EU-sistemo, eble tiu 3-taga seminario en Bruselo de la Verda Europa Fonduso (VEF/GEF) taugas por vi - alighu ghis 2011-05-12:

<http://www.gef.eu/event/news/seminar-greening-europe-toolkit-for-the-european-green-activist/>

La kotizo estas 50 au 90 Euroj por studentoj au ne-studentoj, respektive, sed la vojagkostoj, loghado kaj mangho estos pagataj de GEF. La laborlingvo estos la angla. AVE shatus ke almenau unu el niaj membroj (eble vi ?) partoprenos.

VEF/GEF ankaŭ kunmetis la diversajn **spertojn kiel plani, fari kaj evalui kampanjon**; la retejo montras multajn ekzemplojn kaj informojn: <http://campaignhandbook.gef.eu/>

Arkivo da aliaj okazajhoj:

2011-09-8/11 Europa Verda Somer-Universitato, Frankfurt & Slubice/Odro (DE&PL).

Jen la chefa temaro: Dekstrula populismo - defio por la demokratio / Nova verda konsento - regajneblaj energioj kreas laborlokojn / EU - de ekonomie instigita regado al politika integriĝo.

AVE havos informstandon tie kaj ni prezentos Esperanton, la EU-Himnon.

Nia temo: Se estas dezirinde havi EU-identecon, kio estos la rolo de la lingvo ?

Chu Esperanto povus helpi superi lingvo-naciismon ?

Ni proponas kaj - eble kantos - la EU-Himnon lau teksto de U. Broccatelli

Ankaŭ por ne-membroj de ajna Verda Partio eblas partopreni la VSU, bonvolu alighi mem:

www.green-summer-university.eu

(bedaurinde AVE ne povis partopreni pro manko da kunlaborantoj, intencis nur 2)

2011-06-25/26, Ouagadougou, Burkinafaso, Akademio de la Afrikaj Verduloj

Jam en multaj Afrikaj landoj ekzistas Verdaj (au ekologiaj) Partioj, kiuj kunlaboras en la Federacio de la Afrikaj Verdaj Partioj (AGF): (en, fr) www.africangreens.org

2011-08-10/14 Summer Academy of Ecopolitics 2011

World revolution and ecopeace: theory, practice and bonfire

Venue: Horány – Árnys Sziget Ifjúsági Tábor Youth Camp

(en, hu) <http://okopolmuhely.hu/en/program/>

<http://www.arnyassziget.hu>